Tri klubanoj ĉeestis la 38an Kultur-Semanfinon en HOMBURG. La tradicia -kaj ĉiam tre aprezata- Zamenhof-Vespero okazos la sabaton 18an de januaro en la Kultur-Centro de Marbot-Hinot.

MUNSTER



De la 4a ĝis la 12a de novembro 1991, la liceo de MUNSTER (68) akceptis la ekspozicion de Orientfranca Esperanto-Federacio. Ĉiuj liceanoj kaj profesoroj ricevis invitleteron en esperanto kaj la unuan slipeton de la reklamkurso de UFE ("Votre 1er rendez-vous avec l'Espéranto"). La direktoro lotumis inter la ĝustaj respondoj du premiojn: senpagan partoprenon en semajnfina staĝo kaj libron por memlernado.

Edmond LUDWIG

NANCY Vesperaj kunvenoj kaj kursoj

La laborjaro rekomenciĝis jam la 11an de septembro per kunveno, kiu kunigis 12 personojn. La duagrada kurso tuj ekfunkciis la 18an.

la kampanjo por varbi komencantojn komenciĝis fine de septembro. Entute ni disgluis aŭ disdonis 18 "disdonilojn" de prospektoj en Nancy kaj ĉirkaŭurbo, 110 afiŝojn, 1200 flugfoliojn plus 900 "M4" ("Votre 1er rendez-vous"). La unua planita vespera kurso en la Labor-rondo (Popoluniversitato) tute fiaskis: neniu lernanto venis la 1an de oktobro kaj poste. En **MJC Philippe Desforges** la unua leciono okazis la 9an de oktobro: 8 personoj venis. La 2an semajnon ili estis 11, la 3an 13... (lastminuta informo: 14!) Do ŝajne la kurso bone funkcios, tiel vigle kiel lastjare. El 13 varbitaj, 4 venas pro varbado en la aerfesto, 1 pro ekspozicio printempa en **I.U.T.**, la aliaj pro informado per prospektoj, afiŝoj, gazetkomunikoj, konatuloj... Ĉar niaj afiŝoj estis presitaj de "**la Poŝto**", kaj niaj prospektoj de "**Telecom**", ni povis senprobleme meti afison en ĉiun poŝtoficejon kaj disponigi tie kelkajn prospektojn. Krome, kiel kutime, ni abunde provizumis la Universitaton, liceojn, Junuldomejn, Sociajn kaj Kulturajn Centrojn, la Turisman Oficejon, magazenojn en la proksimeco de la MJC, ktp. Mi aldonu, ke mi estis iom seniluziigita pro la cifero de nur 8 gelernantoj la 1an semajnon: pluraj dekoj da personoj dum ekspozicioj ja plenigis demandilon, indikante sian intereson. Mi telefonis **al ĉiuj**. 2 aŭ 3 fakte venis poste, la aliaj ne plu interesiĝas, aŭ pro novaj okupoj ne plu povas trovi la tempon necesan.

Do, unuagrada ĉiumerkrede, de la 19a ĝis 20a30. Ni devis loki la 2agradan alian tagon: nun almenaŭ 2foje monate, la ĵaŭdon je la 19a, kaj 2foje konversacio aŭ studo de teksto. Krome 3agrada kurso funkcias 2foje monate, la vendredon je la 16a30.

La 25an de septembro vizitis nin denove Ph. Chauvignon, el Chateauroux, kiu prezentis al ni lumbildojn pri Hindio.



Monataj staĝetoj en Nancy

Ili povis funkcii nek oktobre nek novembre pro manko da aliĝoj. Lasta ŝanco estos la 14a de decembro. Kondiĉo: ke almenaŭ 12 personoj aliĝu **firme** kun sendo de ĉeko je 50F.

Nu, elreviĝo: dum la "aerfesto", dum la printempaj ekspozicioj en Nancy, diversaj personoj deklaris sin interesataj de tia staĝo, principe almenaŭ 12 interesatoj. Sed kiel por la vespera kurso, multaj post semajnoj aŭ monatoj ne plu interesiĝas. La cirkulero petanta firman aliĝon kun ĉeko restis senresponda. Je la dato 2a de novembro nur 1 aliĝo!

Ĉu staĝoj monataj tria-gradaj en Nancy?

En Merkviller, iu petis min studi la eblecon organizi staĝojn ĉiumonatajn en Nancy por la tria grado. Mi memorigas, ke tiaj staĝoj por la 2a grado okazis dum la tuta lasta lernjaro. Ĉijare mi provas starigi similajn staĝojn, sed por la komencantoj. Ŝajne homoj pli malpli interesiĝis, sed de kiam mi petis firman aliĝon kun antaŭpago de 50F, venis ĝis mezo de novembro nur... unu aliĝo! Eble la eldono de speciala franclingva "Informilo" disdonenda al ĉirkaŭ 600 personoj, kiuj dum la lastaj jaroj informiĝis pri Esperanto, sukcesos varbi la 11 mankantajn aliĝontojn...

Tria grado povus funkcii, nur se la grado ne povos ekzisti, kaj se almenaŭ 12 personoj interesiĝos. Ni povus studi "**Paŝoj-n al plena posedo**" aŭ alian similan libron. Tiu kurso okazus unufoje monate, sabate, de la 10a ĝis la 17a horo. La kotizo estus 160F por la tuta lernjaro (plus lernolibro). Se vi estas interesata, skribu al mi. Indiku eventuale viajn preferojn pri la verko(j) studota(j). Ne hezitu reagi al tiu informo. La stago funkcios, nur se 12 **interesatoj** anoncos sin. Eble ĝi povos okazi nur venontjare. Skribu tamen tuj, mi faros ion, nur se mi trovos sufiĉan intereson.



J.-P. COLNOT
15, Rue de Lavaux, 54520 LAXOU
Tel.: 83 27 95 55

En la vespera kurso en NANCY venas do 4 personoj pro varbiĝo dum la "aerfesto". en METZ, kie ni rajtis esperi grandan sukceson de nia agado en la aludita evento, la nova vespera kurso varbis 3-4 gelernantojn... sed neniu el ili varbiĝis dum la aerfesto! Ankaŭ neniu perkoresponde aŭ en staĝoj. Mia sinteno nun (okaze de planita nova simila festo post 2 jaroj) estos ne plu partopreni: mi opinias, ke mi elspezis tro da tempo, da energio, por ne grandaj rezultoj. Krome la grava mona perdo (ĉirkaŭ 1500F) pro ŝtelo de nia materialo dum la festo ankoraŭ plu ĝenas la funkcion de la perkoresponda kurso. La printempaj ekspozicioj en Nancy varbis 3 perkorespondajn gelernantojn... (kiuj ne laboras!) kaj 1 vesperan lernantinon (kiu male tre bone laboras!).

Finiĝis plia laborjaro kaj denove gajnis la varb-konkurson de nia Federacio (varb. al la P.-K^o) la grupo de MULHOUSE, kiu varbis (kaj gvidas) 5 homojn. Krome, S-in^o SCHEIDEL varbis 1 lernantinon. Gratulojn!

PERKORESPONDA KURSO

Kunlaborantoj de la kurso. Kunlaboras dum la nova lernjaro: P. DENIS (55000 Bar-le-Duc), A. GROSSMANN (68390 Baldersheim), R. DEGRELLE (54490 Piennes), G. GREINER (54570 Foug), E. LUDWIG (68140 Stosswihr), René GUILLAUME (33190 Hure), C. ROUX (54500 Vandoeuvre), J.-L. THIBIAS (94310 Joinville-le-Pont), Christiane BUSSE (68140 Stosswihr), E. BARRIER (68720 Hochstatt), Francine PARADIS (54110 DOMBASLE), R. KUENY (68490 Bantzenheim) plus la subskribintoj (54520 Laxou).

Oni do konstatas, ke estas 1 kunlaboranto en 55, 5 en 54, 5 en 68, plus 2 ekster nia Federacio do 13 entute. Tamen estas neniu en departementoj 57, 67 kaj 88. Ĉu neniu tiea samideano deziras kunlabori, gvidante najbarajn gelernantojn?

Deficito en ka kontoj de la P.-K°. La jaraj poŝtaj elspezoj sumis pli ol 3500F, ĉar la poŝta tarifo plialtiĝis, ankaŭ ĉar pro la "aerfesto" estis dissenditaj pli multaj leteroj. Entute la elspezoj de la lernojaras sumas 15 118,95F, la elspezoj 17 616,85F, el kio rezultas deficito je 2497,90F. La ŝtelo dum la "aerfesto" malgrandigis nian stokon (ĉirkaŭ 1200F apartenis al tiu stoko). La rezulto estas, ke restas malmulte da mono en la poŝtĉek-konto, ke la aĉeto de la kurslibroj aŭ aliaj elspezoj povas esti pagitaj nur post enkasigo de sufiĉe da vendoj aŭ kotizoj. Dankon al S-r° MOUGIN (55-ETAIN), kiu per 200F-ĉeko helpis "ŝtopi la truon"!

Ĝenerala rigardo al la kurso. Mi aldonu, ke kelkaj gelernantoj bone kaj rapide laboras kaj finlernas "Metodon 11" en kelkaj monatoj (inter 10 kaj 40% de la lernantaro laŭ la jaroj). Troviĝas ke ĉi-jare S-in° BUSSE gvidis 3 gelernantojn ĝis la kursofino... dum aliaj kunlab. plendas, ke ĝenerale iliaj gelernantoj restas "fantomaj", tute ne laboras, aŭ baldaŭ ne plu laboras, plej ofte ne respondas instigo-leterojn. Kion fari? Kiam lernant(in)o aliĝas, ne eblas scii antaŭe, ĉu li (ŝi) bone laboros aŭ ne! Principe mi direktas lernantojn al najbara gvidanto (kiam eblas!). Sed, kiel dirite, ne estas kunlaborantoj en ĉiuj departementoj.

Disdono de "Metodo 4". Ni disdonis ĉirkaŭ 2500 "1-an rendezuon" dum la aerfesto. 2 interesatoj respondis la teston. Pluraj centoj disdonitaj en THAON: **neniu respondo.** Ni disdonis 900 en NANCY: 1 respondo. Entute 3 respondoj el 4000 dokumentoj... **Neniu aliĝis al la kurso!**

23 gelernantoj ni jam antaŭe anoncis la atingon de la kursfino de 2 el ili. Nun tria alproksimiĝas al la fino de "Metodo 11" (kaj ĉeestis la staĝon en Merkwiller): Sin° Marie-José GISSELBRECHT en 67600 Mutterholz. Ni notu, ke la 3 finlernintoj ĉi-jare estis gviditaj de Sin° Busse (Stosswihr). Tre sincerajn gratulojn!

Ek de oktobro denove dissendiĝis 25 komunikoj al la regiona gazeto por anonci la P.K°n, la staĝon de Merkwiller kaj la planitajn monatajn stagojn en Nancy. Ĝenerale la gazetoj ne multe esprimis (4 la unuan komunikon, ŝajne nur unu la oktobran). Krome estis tre malmultaj reagoj. Kvar personoj aliĝis.



FROUARD

Mi opiniis, ke kurso devus esti ne nur en ĉefurbo, kie la popolano povus lerni la internacian lingvon sed ankaŭ aliloke.

Do laŭ miaj eblecoj mi klopodis prepari novkurson en mia urbeto. Mi renkontis la afablan urbestron kaj klarigis al li pri esperanto. Li informis min, ke mi devus kontakti junular-asociation, kiu ekzistas tiumomente. Mi kontaktis ties prezidanton kaj la direktoron, kiuj unue demandis min: "Kiom da ĉeestontoj?..". Mi respondis sincer-ŝercante: "Mi ne scias... Ĉu malpli ol unu, ĉu centoj!"

Aperis sur la bulteno de la "Jade"-Asocio la sekvanta informo: "Nova kurso komenciĝos la 5an de novembro 1991". Kelkaj homoj telefone petis informojn... kaj "la tago" alvenis. Surprizo... 6 interesatoj prezentiĝis. Do, mi povus instrui kurage, tamen streĉita. Nova pluzuro: post 2 lecionoj alvenis unu nova lernantino. Resume, ĉeestas 4 gejunuloj kaj 3 malpli junaj inoj...

Faru kiel mi: instru la bazojn de la lingvo kaj la murmurego traire kampojn!

VITO - Frouard "Jade" CLEF



EN THAON-les-VOSGES...

Kiel lastjare, F. Simonnet kaj mi prezentis esperanton okaze de la "Festo de la Homo, Naturo kaj Ĉirkaŭaĵo", la 14/15ajn de septembro. Pluraj esperantistoj el Nancy venis helpi dum kelkaj horoj. La vetero estis eble (tre?) bela? Ŝajne estis malpli da vizitantoj ol lastjare. Krom nia ekspozicio ni prezentis la video-kasedon de UFE. Ŝajnis pli malfacile interesi homojn. Nur 6 konsentis pleniĝi demandilon. El la 6, unu deziris kurson en Gerardmer: mi transdonis la peton al Sr° Colin, kiu kontentige solvis la aferon (kiel jam lastjare). Kvar aliaj deziris kurson en Epinal. Kaj jen dramo: mi sendis la adresojn al tiea samideano. Neniu respondo. Mi provis kontakti lin telefone, vane. Mi turnis min al 3 aliaj samideanoj: neniu havas tempon por fari ion. Do, post 4-semajna enketado, mi devis respondi al la 4 interesatoj, ke neniu povas gvidi ilin. En Epinal ili do povas aliĝi perkoresponde aŭ veni en staĝoj en Nancy. Fakte unu persono aliĝis tuj post "Thaon". La 4 aliaj ne donis sekvon. Mi opinias, ke mi-mem venontjare ne plu deĵoros en Thaon: jam la antaŭan jaron mi konstatis, ke voĝejaj samideanoj ne estas kunlaboremaj, krom Gerardmer. Do, estas vane klopodi por interesi homojn al E°, se poste oni devas diri al ili "neniu najbara de vi deziras instrui al vi la lingvon..."

J.-P. Colnot

Laŭ peto de nia samideano Lothar ECKERT, ni presigas tiun "alvokon", kies enhavon ĉiu esperantisto ne povas ne aprobi.



la redaktoro de "L.I"o"

Turista Asocio »La Naturamikoj« r.a.

Landa Ligo Badeno

Alvoko de Waldkirch

Naturamikoj 2000:
nature *natura!*

Nacia estas la politika agado, internaciaj estas ties socialaj kaj politikaj sekvoj.

Pro tio naciaj ŝtatoj kaj aliancoj ne rajtas pli longe iri siajn proprajn vojojn.

La industria ŝtatoj de la tero ne rajtas plu vivi je la kostoj de la landoj de la Tria Mondo, ekzistas nur >>Unu Mondo<< por ni ĉiuj.

Ni bezonas interpopolan komunumon, kiu agas demokratie, ekologie kaj sociale kaj kiu anstataŭigas perforton kaj militon per toleremo kaj paco.

En la malnova mondo inter Eŭfrato kaj Tigriso ekkreskis antaŭ jarmiloj unuaj kulturoj de la homaro.

El tiu spirita, praktika kaj arta origino ekestis multaj radikoj de la kulturoj en Eŭropo.

Sed en Eŭropo ankaŭ troviĝas radikoj de detruo de kulturo kaj naturo.

Ni en Eŭropo havas la ekonomiajn kaj teknologiajn kapablojn por forlasi la vojon de la memdetruo.

Ni Naturamikoj sentas nin tradicie ligitaj al la interpopola agado.

Pro tio ni volas kontribui al tio, ke ĉie ekkresku homoj kaj naturamika konscio.

Tutmonda kaj tuteca pensado kaj loka agado estas la direktiloj en la tempo sur la vojo al la >>Tria Jarmilo<<.

KONFERENCO DE LA BADENAJ NATURAMIKOJ Gravaj decidoj en Waldkirch

Dum la konferenco de la badenaj Naturamikoj, la 11an/12an de majo en Waldkirch, suda Nigra Arbaro ĉe Frajburgo, oni konstatis, ke la Naturamikoj estas firme ligitaj al la demokratia socialismo kaj ke jam ek de la 20aj jaroj de nia jarcento ili estas sur la naturprotektanta vojo.

Pli ol 200 delegitoj decidis la "Alvokon de Waldkirch", kiu pritraktas bazajn eldirojn, aktivaĵojn kaj celojn de la badenaj Naturamikoj.

Granda deziro estas, ke multaj homoj subtenu kaj agu laŭ la "Alvoko de Waldkirch".

Lothar Eckert, Germanio

~~~~~

## Naturamikoj agadas ...

**Ni Naturamikoj volas**

mondvastan partnerecon inter la popoloj, en kiu milita perforto ne plu estas rimedo de la politiko. Naciismo, persekuto, subpremo kaj la produktado de ekstermaj armiloj estas kondamnendaj.

**Ni Naturamikoj volas**

mondvastan socialan respondecon por la homoj en la Tria Mondo kaj en Orienteŭropo.

**Ni Naturamikoj volas**

medie kaj sociale akomoditan manieron de la produktado, kiu celas protekton de la vivbazoj.

Pro tio ni serĉas la kunlaboron kun ĉiuj homoj, kiuj naturlige, pace kaj home pensadas kaj agadas.

Pro tio ni helpas ĉe la refondaj laboroj de la iam malpermesataj naturamikaj grupoj en meza kaj orienta Eŭropo.

Pro tio ni konsideras niajn domojn kiel lokoj de internaciaj renkontiĝoj.

Pro tio ni faras translimajn partnerecojn.

Pro tio ni konstruas niajn domojn laŭ ekologiaj principoj.

Pro tio ni volas sociale akomoditan kaj naturamikan turismon.

Pro tio ni postulas de ĉiuj politikaj respondeculoj realigi tiujn celojn de la Naturamikoj.

Ĉar en ĉiuj tempoj konscio kaj spirita protesto estis la sekvoj de ekkono kaj bazo de la agado.

... por vivinda estonteco

PRI LA KONCEPTO DE RICECO EN LINGVISTIKO

Tre ofte, esperantistoj, diskutante kun kontraŭuloj, aŭdas tiun argumenton: "Esperanto estas **malriĉa** lingvo kompare kun la franca, angla..." (laŭ la nacia lingvo de la kontraŭulo).

Ni studos tiun argumenton laŭ tri vidpunktoj: Realeco, Kreebleco, Utiligebleco.

REALECO

Por la plimulto de la oponentoj al E<sup>o</sup>, kiuj, plej ofte, **nenion scias** pri la problemo, E<sup>o</sup> estas kreita de **unu** homo. Tiel ĝi estis... tiel ĝi ankoraŭ estas. Fakte la realeco estas tute alia.

1 = ZAMENHOF **ne kreis** la lingvon: li simple proponis kadron, programon; same kiel hodiaŭ scienca malkovro plej ofte, ne mirakle fontas el cerbo de izolita scienculo, sed estas la rezulto de la laboro de deoj, centoj da serĉantoj el diversaj landoj.

Same, esperanto, simpla **programo**, riĉiĝis de la **kreaĵoj** de milionoj da utiligantoj el la tuta mondo.

2 = La **ciferoj** reliefigas tiun realecon:

- 912 radikoj en 1887
- 15 000 kaj eĉ pli, hodiaŭ.

...ne enkalkulante **pli ol 160 leksikonoj** kourante **pli ol 50 specialaĵoj** (teknikaj, sciencaj, artaj, ktp).

3 = Tiu **riĉiĝo**, kiu havas siajn fontojn en milionoj da homoj apartenantaj al landoj, kiuj posedas civilizaciojn, morojn, religiojn, kutimojn, klimatojn, florojn, faŭnojn, pejzaĝojn... **malsimilajn, estas nekomparebla!** Kiu alia lingvo povus depostuli **similan riĉecon?** Neniu alia povas pretendi tiel ampleksajn fontojn de riĉiĝo.

4 = Krome, tiuj sennombraj nuancoj estis **ne tradukitaj sed kreitaj** en Esperanto, de tiuj kiuj plej **intime** konas tiujn nuancojn, kiuj apartenas al ilia propra lingvo, al ilia propra sentebleco.

Kiu alia lingvo povas pretendi al tiel fidela riĉiĝo?

KREEBLECO

Franca lingvo estas ofte konsiderata kiel riĉa lingvo. Sur ĝi, do, ni bazos niajn komparojn. Ofte la Francoj plendas pri la invado de la franca lingvo pere de **anglismoj**. Sed kiom el ili kuraĝis konstati ke inter la diversaj faktoroj, kiuj povas komprenigi tiun problemon, la fakto ke franca lingvo **ne kapablas** krei la vortojn, kiuj ĝi bezonas, estas netransirebla: simple ĉar **ĝia strukturo** ne permesas tion!

Ni prenu kelkajn ekzemplojn:

Kvankam de kelkaj jaroj la profesora profesio fariĝis pli kaj pli **virina**, franca lingvo ne kapablis krei vorton korespondante al la moderna kaj aktuala situacio.

Tio estigas neniun problemon por Esperanto, kiu, **tuj, kreas** la necesan vorton: "**profesorino**." Tute same estas por: "**juĝistino, urbestrino, inĝenierino, ministrino, ktp**"

Centojn da ekzemploj ni povus tiel trovi.

UTILIGEBLECO

Daŭrigu ni nian komparon kun la franca lingvo:

1 = La fama vortaro "**Grand Larousse**" en dek volumoj entenas **pli ol 200 000** vortojn.

2 = Alia vortaro: "**Trésor de la langue française** plurajn **centojn da miloj** da vortoj kaj plurajn **milionojn** da uzoj... sed...

... la studo pri **oftecoj** (de uzado de vortoj en lingvo parolata aŭ skribata) montras ke:

a - la **4000 pli uzataj vortoj** reprezentas pli ol **97,5%** de la vortoj utiligataj de la Francoj.

b - tio, do, klare montras, ke **malpli ol 1%** de la riĉeco de la lingvo estas utiligita!...

Al kio, do, al kiu, do utilas tiu **mirinda riĉeco?**

Al **nenio, al neniu**, ĉar ĝi **ne estas utiligebla!** KIAL DO TIU NEUTILIGEBLECO?... Ĉefe ĉar la franca lingvo estas vera haoso, vera jungalo, en kiu eĉ la **plej klera** ne sukcesas orientiĝi.

Faru tiun eksperimenton:

Post klarigo de kelkaj vortoj en esperanto, petu ni, de klera Franco, la francan tradukon de vortoj tiel simplaj kiel "**ĉasa, kata, ŝafa, fratina**"

Vi tuj konstatos, ke la respondo ne venas rapide eĉ se ĝi venas!

Kial? tutsimple ĉar, en la franca, la **radikoj** de caso, kato, safo kaj frato havas **nenian rilaton**, nek **similecon** kun tiu de casa, kata, safa kaj fratina (*chasse/cynégétique, chat/félin, mouton/ovin, frère/sestral...*).

Provu denove kun... **ĉevalejo, azenejo, kapreĵo, anasejo, anserejo...**". Tiam vi konstatos ke, se la unua vorto estas -relative- trovita (*écurie*), la sekvantaj restos sen respondo, tutsimple ĉar... **ili ne ekzistas** en franca lingvo! Tutsimple ĉar, **male de Esperanto**, franca lingvo **ne kapablas** krei la vortojn necesajn por nomi la plej ordinaraĵojn de la ĉiutaga vivo!

RIĈECO JE LA SERVO DE ĈIUJ

La granda diferenco inter Esperanto kaj la aliaj lingvoj kuŝas tie: dank' al ĝia strukturo, la senlima riĉeco de Esperanto estas je la **dispono de ĉiuj**, de la plej modesta gis la plej kulturita uzanto. Riĉeco disponebla:

- **pasive**, ĉar facile komprenebla, ĉu skribe, ĉu buŝe.
- **aktive**, ĉar, por ĉiuj nuancoj, **nova vorto povas esti facile kreita**.

KONKLUDE

Konklude ni rajtas diri ke, se la obstinaj kontraŭuloj de Esperanto havus minimumon da scienca konscio, ili **studus** problemon antaŭ ol juĝi... sed, bedaŭrinde, ili kontentiĝas rediri **falsajn evidentecojn** centfoje aŭditaj kaj neniam kontrolitaj.

Se estus alie, ili devus agnoski, ke neniu lingvo povas fieri posedi tiel vastan riĉecon kiel Esperanto. Eble iam tio okazos? Oni devas neniam malesperi!



POUR UN ESPERANTISTE  
LA "JOURNEE DU LIVRE"  
DURE TOUTE L'ANNEE!

LIBRO-SERVO  
12, Rue E. d'Orves  
F-54490 PIENNES

Kio estas Esperantisto, kiu **nek** aĉetas librojn kaj **nek** legas? Jes, kia esperantisto li estas?

☆ Via libro-servo proponas al vi kelkajn novaĵojn kaj malnovaĵojn...

uz-modo :

Simpla mendo-poŝtkarto.  
Baldaŭa libropakaĵo  
kun interna fakturo via  
kaj danko anticipa  
pro via pago tuja!

1 = Tibor SEKEJL - "Giambo Rafiki" - 73 F

Tibor Sekejl, esploristo, ĵurnalisto, etnografo, verkisto de pli ol 20 libroj, montras ĉi-tie siajn multifacetajn profesiajn spertojn, kaj tiun plenkoran homecon en la internaciaj rilatoj, kiu estis lia plej evidenta karakterizo.

2 = André WECKMANN - "La ronkanta avo", en traduko de Edmond Ludwig - 25 F  
Eldonita de nia Orientfranca Esperanto-Federacio. Rakonto por infanoj, lerte skribita, perfekte tradukita. Nia unua eldonajo, ne la lasta... sed iom da pacienco!

3 = Gates - "La septaga murdenigmo" - 35 F

La verva kaj kolorita stilo de tiuj romantipoj ebligas asimili kaj manipuli nian lingvon plezurmaniere. La krim-evento de ĉi-tiu verko daŭras evidente sep tagojn! Bele skribita, kun enigmo bone kaj ĝisfine ŝpinita!

4 = Claude PIRON - "Dankon Amiko!" - 35 F

Mallonga romano por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson. En perfekta, simpla, belsona Esperanto, de la aŭtoro de la "Ĉu...?"-romanoj, de "Gerda malaperis", de "Lasu min labori plu".

Tiuj kvar titoloj, eltiritaj el nia libro-katalogo, kiu entenas pli ol 200 titoloj, do por ĉiuj legogustoj, legodeziroj, legoplezuroj.

**Ne lasu tiun ripetatan "libro-tago" sen aĉeti Esperanto-libron!**

.... Via libro-servisto  
Roger DEGRELLE

P.-S°: Pri la libroj anoncotaj, kelkaj prezoj ŝanĝiĝis... (Tiu sencesa prezoŝanĝiĝo estas daŭre senŝanĝa!...). Jen ekzemple:

"Lasu min paroli plu": 60 F - "Gerda malaperis": 22 F  
Denove havebla: "Saluton-Esperanto aŭtodidakte": 76 F

☆☆☆☆☆

*Rondelo de la "libro-tago"*

*Jen denove libro-tago  
Por legplezur' kaj monmalŝpar'  
Ĉu ne bonas, ke en ĉi-jar'  
Vi aĉetu sen zigzago*

*... Bonan libron por propago  
De la internacia var'!  
Jen denove libro-tago  
Por legplezur' kaj monmalŝpar'!*

*Kaj sub nia verda flago  
Al konstruo de la homar'  
Alvenos kun la ĝojdeklar'  
La tujmono de la pago (1)  
Dum denova libro-tago.*

*(1) ĉar ĉiu poeto bona  
nur estas proleto... mona!*

*Roger Degrelle  
1991 / 10 / 23*

☆☆☆

C'est à répondre à cette interrogation que s'est attaché **Claude PIRON**, avec une érudition, une compétence et une clarté qui font de son exposé un véritable régal pour l'esprit. Il offre à tous les espérantistes convaincus, mais à qui font défaut, généralement, les compétences linguistiques nécessaires, des arguments et des informations limpides, précises, irréfutables.

LANGUE ISOLANTE

Le lecteur découvre, avec un mélange d'étonnement et d'admiration, que Zamenhof, bien que ne possédant que des langues flexionnelles, a su redécouvrir tout ce qui fait la valeur et les grandes qualités des langues isolantes comme **le chinois**:

= une très grande **régularité** (et donc **simplicité**)  
 = une **fécondité** extraordinaire dans la possibilité qu'elle donne...

- de composer des mots, et donc...
- de nuancer, à l'infini, **toutes** les expressions de la pensée, ceci avec le **minimum** d'appel à la mémoire, et le **maximum** de recours à l'**intelligence** et à la **créativité**.

LANGUE AGGLUTINANTE

Il montre aussi que, bien que fondamentalement langue isolante (du type "chinois") l'Espéranto n'est pas sans parenté avec les langues **agglutinantes** (type "japonais", "hongrois...") par la clarté avec laquelle est mise en évidence la **structure grammaticale** de la phrase.

Cette brochure porte le n°12 d'une série fort intéressante "ESPERANTO-DOKUMENTOJ" à laquelle il est possible de s'abonner: 10 numéros pour 130F

\*\*\*\*\*

Materiel à votre disposition:

- Vous pouvez vous procurer les affichettes éditées par notre Fédération avec 5 textes différents au format de 20x5,5 cm et de couleurs différentes, par exemple:

**ESPERANTO**

Votre deuxième langue !

Prix franco: 15 affichettes à 5 F    40 affichettes à 9 F

- Ont également un grand succès des **Cartes de visites** qui présentent succinctement l'Espéranto. On y trouve l'adresse de l'UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi: Prix franco: 8 cartes 9 F,    20 cartes 17 F

Figurent également à notre catalogue les livres suivants:

- **Lexique Fondamental** Espéranto-Français de R. Léger 112 pages. Prix franco: 18 F
- **Amuzaj dialogoj en Esperanto** de A.Lienhardt. Troisième édition, non illustrée mais avec traduction en chinois. 140 pages comportant 20 dialogues humoristiques et 850 questions et réponses. Prix franco: 28 F
- **Facilaj dialogoj en Esperanto** de A.Lienhardt. 12 dialogues vivants en Espéranto et en français, pour apprendre rapidement à parler la langue internationale. Nombreuses questions et réponses didactiques complémentaires. Prix franco: le livret 34 F la cassette d'accompagnement 36 F
- **Amuzaj legolibro en Esperanto** de A.Lienhardt. 100 histoires drôles et 2000 questions/réponses, qui permettent aux débutants d'apprendre facilement à parler l'espéranto. 2 cassettes d'accompagnement comportent l'enregistrement des 100 histoires. Prix franco: le livre 55 F    la cassette 36 F

Veuillez passer vos commandes à: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM. Fédération de l'Est pour l'Espéranto - CCP 1997-72 V Nancy

\*\*\*\*\*

**DANKON** al David kaj Patricia GREINER, kiuj donacis al nia federacia kaso 496,20F. Tiu monsumo kolektiĝis okaze de ilia geedziĝo. David estas la filo de nia daŭra kunlaboranto Gérard GREINER, en 54-FOUG.

\*\*\*\*\*

AUTRES CARACTERISTIQUES

**1 = Indo-européen**, l'Espéranto ne l'est (contrairement à ce qu'on pense généralement), que par quelques traits particuliers (accord **au pluriel** et à l'**accusatif** des adjectifs par exemple).

**2 = Slave**, l'Espéranto l'est incontestablement, et Claude PIRON le prouve abondamment, tant par l'ordre des mots que par le **style**, la **syntaxe** et par bien d'autres aspects encore.

**3 = Germanique et Roman**, l'E° l'est par sa phonétique et la forme des mots.

**4 = Ce n'est que dans son apparence superficielle**, par l'**origine de ses radicaux** que l'E° semble se rattacher essentiellement aux **langues occidentales**.

Et c'est, en général, sur cette seule apparence, qu'est jugé le degré d'internationalité de l'Espéranto. Ce qui montre à quel point ceux qui le jugent péremptoirement (et avec quelle condescendance souvent) ne réalisent pas que, ce faisant, ils donnent une démonstration consternante et du peu de sérieux de leur propos.

Voici donc une brochure de référence que tout espérantiste se doit de posséder dans sa bibliothèque.

Jean MARIN

"L'Espéranto, langue européenne ou asiatique?"  
 Claude PIRON - 35 pages - format 15x21 - 10F + frais d'envoi 20% à UFE.

## notre service de correspondance "à la carte"



Créé sous l'égide de l'Association Universelle d'Espéranto (U.E.A.) il y a plusieurs décennies, le KORESPOND-SERVO MONDSKALA (K.S.M.) a connu d'emblée un grand succès.

Il s'agit en effet d'un système original d'appariement entre espérantophones désireux d'entretenir d'abord des relations épistolaires en Langue Internationale sur des thèmes précis et dans des pays bien définis.

Chaque personne intéressée rédige une "fiche signalétique" qui concerne bien sûr le demandeur mais qui contient une sorte de "silhouette-robot" du correspondant à contacter. Ce document, inséré dans un ordinateur est confronté à un stock de fiches mises précédemment "en mémoire", susceptible de mettre à jour celle qui se rapproche le plus des désirs exprimés de part et d'autre...

Ce service unique en son genre reçoit chaque jour des demandes de correspondance émanant de tous pays.

Ni atentigas la uzontojn de nia tutmonda servo pri la **ek de nun** nepre simpligita kaj uzenda adreso:

K. S. M.  
BP 6  
F-55000 LONGEVILLE-en-BARROIS

Nepre uzu ĝin, tia kia ĝi estas (siglo... BP...)

**Grave:** multaj petintoj redaktis sian adreson tiel mallegeble (eĉ foje per cirila alfabeto!), ke KSM tute ne kapablis elkriptigi ĝin. Sekve la letero restis nepritraktata! Do, vian adreson skribu prefere **preslitere** kaj nepre per latina alfabeto!



### KOTIZOJ kaj ABONOJ 1992

Jen vi havas inter viaj manoj la lastan numeron de La Informilo por 1991, per ĝi, finiĝas via abono por ĉi-jaro. Tre verŝajne vi ŝatas ĝian enhavon, kaj grave taksas la klopodojn faritajn por ĝia eldonado. Certe vi daŭre deziras ricevi ĝin, ankaŭ en 1992. Jen alvenis la momento por pagi vian jar-abonon al La Informilo por 1992. Bonvolu fari tion senprokraste, vi tiel faciligos la laboron de nia kasisto, kaj forigos la riskon ne regule ricevi La Informilon.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (departementoj 54 55 57 67 68 88) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, aŭ se vi ne intencas aliĝi al UFE, bonvolu sam-okaze pagi vian federacian kotizon je 25 FF por iĝi aŭ resti federacia membro. Profitu tiun okazon por menciigi vian eventualan adres-ŝanĝon.

Aparte vi trovos la tarifojn de la UFE/UEA-kotizoj, kiujn vi bonvolu rekte pagi al UFE helpe de la aliĝilo, kiun ricevis ĉiuj ĉi-jaraj membroj. Sed vi neniam pagu la abonon al La Informilo al UFE. Tio estus perdita mono, kaj postulus vana interŝanĝo de leteroj.

|                                                       | Jaroj: | 1992      | 1993  |
|-------------------------------------------------------|--------|-----------|-------|
| - Abono al La Informilo por enlandaj adresoj          |        | 45 FF     | 45 FF |
| - Abono al La Informilo por eksterlando               |        | 18 Rpk aŭ | 57 FF |
| - Federacia kotizo                                    |        | 25 FF     | 26 FF |
| - Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando |        | 20 FF     | 20 FF |

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:

FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PĈK 1997 72W NANCY

Aŭ rekte per bankĉeko al nia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

## Nos cotisations 1992

Vous venez de recevoir, pour l'année 1991, votre dernier bulletin d'information sur l'Espéranto, **LA INFORMILO**. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement (4 numéros par an) pour 1992. A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1992 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

### COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT


- 1/ Les cotisations à l'UFE et à l'UEA, (catégorie 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 1991 de l'UFE, sinon celui que vous trouverez dans ce numéro. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Fédération, mais jamais à l'UFE.
- 2/ La cotisation à la FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
  - = de préférence par virement postal à FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO  
CCP 1997 72W NANCY (pratique et sans frais)
  - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même fédération, mais adressé à notre trésorier:  
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
  - = Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du Groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20 F), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

### Cat. TABLEAU DES COTISATIONS 1992

- | Cat.                                                                                                             | cotis. | abonnem.<br>Informilo |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|--------|-----------------------|
| 1 = abonnement simple à La INFORMILO                                                                             |        | 45 F                  |
| 2 = adhésion simple à la FÉDÉRATION CULT. DE L'EST                                                               |        |                       |
| * membre fédéral avec abonnement à La INFORMILO                                                                  | 25 F   | + 45 F                |
| * membre fédéral sans abonnement à La INFORMILO pour les autres membres de la famille par exemple                | 25 F   |                       |
| 3 = adhésion à la FÉDÉRATION et à l'U.F.E.                                                                       |        |                       |
| * membre simple                                                                                                  | 140 F  | + 45 F                |
| * membre actif JEFO moins de 30 ans au 01.10.91                                                                  | 100 F  | + 45 F                |
| * membre actif JEFO Etudiant, chômeur, scolaire, militaire                                                       | 65 F   | + 45 F                |
| * membre actif UFE avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO"                                                 | 250 F  | + 45 F                |
| * membre actif UFE conjoint                                                                                      | 130 F  |                       |
| 4 = adhésion à la FÉDÉRATION + U.F.E. + U.E.A.                                                                   |        |                       |
| * membre individuel reçoit "F.E." + guide de l'UEA                                                               | 295 F  | + 45 F                |
| * membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + (revue KONTAKTO, si moins de 30 ans)                       | 355 F  | + 45 F                |
| * membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + (KONTAKTO, si moins de 30 ans) | 510 F  | + 45 F                |

### IMPORTANT

- 1 - Les nouveaux adhérents recevront par courrier séparé leur(s) carte(s) de membre à la Fédération, à l'UFE, à l'UEA, selon les cotisations payées ainsi qu'un exemplaire des statuts de notre Fédération.
- 2 - Les autres membres trouveront dans le bulletin La Informilo, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 1992, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 1992 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3 - Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES GEE.
- 4 - Les jeunes de moins de 30 ans au 01.10.91, payant leur cotisation de l'UFE ou de JEFO, voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANÇAISE JEFO et recevront alors en plus la revue Koncize et le bulletin interne national JEFO informas. Ils auront droit de vote au Comité de JEFO.



### NIAJ STATISTIKOJ

Jam de 6 jaroj mi uzas mian Atari-komputoron por administri la federaciajn kotizojn kaj abonojn. Ĉi-jare mi programis novan grafikon, kiu montras laŭ la jaroj la nombrojn da abonantoj kaj membroj. Bonvolu trovi ĉi-supre per tiu grafiko, kiel en tiuj lastaj 6 jaroj progresis kaj malprogresis niaj abonantoj kaj membroj.

Diversaj konkludoj estas fareblaj. Mia espero, atingi pli ol 250 abonantojn, ne realiĝis. La jaro 1989 aspektas kiel la plej sukcesa. Ĉu la postaj malprogresoj estas nur provizoraj, ĉu la ondo refoje altiĝos? Ni esperu tion. La nombro da membroj preskaŭ paralele progresas kaj malprogresas kiel la abonantoj. Ni esperu, ke tio estas nur ondo, kiu post la malleviĝo, denove releviĝas. Sed vi ĉiuj povas influi tiun ondon, pagante sen-prokraste viajn kotizon kaj abonon por 1992 kaj instigante aliajn same fari. Dankon pro via kontribuo.



A. Grossmann

### ABONU KAJ VIVIGU NIAJN PRESAĴOJN!...

(peradas UFE, 4bis, Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS)

|                                                       |     |                                                               |         |
|-------------------------------------------------------|-----|---------------------------------------------------------------|---------|
| Brita Esperantisto (6 numeroj)                        | 100 | La Juna Amiko (Int. lerneja revuo) (4 numeroj)                | 36      |
| Bulgara Esperantisto                                  | 100 | La Kancerkliniko (por 5 numeroj)                              | 115     |
| Dia Regno (11 numeroj)                                | 65  | Lingvaj problemoj Lingvo Planado                              | 190     |
| Dua Jarcento (Bult. Internacia Muzeo Wien)            | 100 | Literatura Foiro (6 numeroj)                                  | 165     |
| Ekumenismo                                            | 60  | Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto                    |         |
| El Popola Ĉinio (1 jaro NUR -12 numeroj)              | 150 |                                                               | po 3 60 |
| Enigma (krucvortoj kaj similaĵ - 4 numeroj)           |     |                                                               | po 1 25 |
| Esperanto (por ne Membro-Abonantoj de UEA) 11 numeroj | 155 | Monato (12 numeroj)                                           | 185     |
| Esperanto-Actualités (en français) pour 5 ans         | 170 | Monato aerpoŝte                                               | 230     |
| Esperanto-dokumentoj (en la angla, franca, aŭ esp.)   | 130 | - La Jaro (poŝkalendaro de Monato)                            | 24,50   |
| Franca Esperantisto (por ne aktivaj UFE-membroj)      |     | Rok'Gazet (4 numeroj)                                         | 100     |
| (10 numeroj jare)                                     | 160 | Simpozio (2 numeroj jare)                                     | 60      |
| Franca Katolika Espero                                | 40  | Verda Lupeo / Fenikso                                         | 60      |
| Heroldo de Esperanto (16 numeroj jare)                | 144 |                                                               |         |
| Heroldo aerpoŝte (konsilinde)                         | 169 | Aboni geomikojn el nepagipovaj landoj ankaŭ eblas pere de UFE |         |
| Kontakto (por ne TEJO-membroj)                        | 60  |                                                               |         |
| Kulturaj Kajeroj (4 numeroj)                          | 70  |                                                               |         |



# ? U distra angelo



-- "SILAB"-ENIGMO --

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ab ala an an ar ban co dio do do do el er ia im is ka ko ko kon kon kor lan lo me mo no no no ob pe pet pos pta rar ru ru sar so sol sti te to to to tr tri tri um ur var vi

- 1 + - - + - - - - plenakordo
- 2 + - - + - - - - alŝtata "ŝuldo"
- 3 + - - + - - - - muzo de l' astronomio
- 4 + - - + - - - - mildigi ies ĉagrenon
- 5 + - - + - - - - ondokaptilo
- 6 + - - + - - - - itala humanisto
- 7 + - - + - - - - maldelikata, vulgara
- 8 + - - + - - - - paŝtista paradizo
- 9 + - - + - - - - jardato ligata al la suno
- 10 + - - + - - - - muzikilo
- 11 + - - + - - - - ŝtofa ornamaĵo
- 12 + - - + - - - - monumento
- 13 + - - + - - - - fajroproduktaĵo
- 14 + - - + - - - - malagrable subita
- 15 + - - + - - - - germana regiono
- 16 + - - + - - - - mardio
- 17 + - - + - - - - specio de mustelo

☆☆

### JARFINA KONKURSO

Al la 3 unuaj solvontoj de la 2 enigmoj (laŭ la stampano-dato sur la koverto) ni donace sendos libron. Bonvolu adresi viajn solvojn al:

"La Informilo"  
5, Chemin de Blamecourt  
F-55000 BAR-le-DUC

☆☆

### -- KRUCVORT-ENIGMO --

|    |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|
|    | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 |
| 1  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 2  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 3  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 4  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 5  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 6  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 7  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 8  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 9  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 10 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 11 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 12 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 13 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 14 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 15 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 16 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 17 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
| 18 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |

**HORIZONTALE**

- 1 asigni ion al iu - teknika laborejo - aparta kapablo.
- 2 tre laŭte voĉumi(r) - maljuna - elektroproduktilo(r) - finjara festo - specifa kapablo en iu fakto(r).
- 3 legomo - ekzistoverbo - instrumentaro(r) - mondoparto.
- 4 monafa robo(r) - daŭre renaskiĝanta birdo - vestaĵo.
- 5 artiklo - demandvorto - premomezurilo - preni kiel rimedon - muziknoto.
- 6 sufikso - nedifina adjektivo - prilabori felon(r) - anserbleki(r) - numeralo - prepozicio.
- 7 atomnumero 53 - rilata al astro - krea imagipovo - natria karbonato.
- 8 homloĝejo - legomo(r) - grasaĵo(r) - dikega voĉmaniere.
- 9 ĉefurbo(r) - numeralo - sufikso.
- 10 hispankuraĝinstigo - malnova mezurunuo(r) - batrako(r).
- 11 malplezuri pro neokupiteco - rilate al humura teatraĵeto - tre trafa malsameco - aromaĵo(r).
- 12 lumigilo(r) - nemateria esenco(r) - fikтивaj punktolinioj de surtera premo - virina antaŭnomo.
- 13 prepozicio - verbofinaĵo - adjektivita sufikso - monato(r) - ujo(fonet.) - konjunkcio.
- 14 metalo(r) - monprunti ion dum difinita tempo - eltiraĵo - adverbo - litero.
- 15 kolparto - familiano - senharmonia sono.
- 16 insekto - enparka pado - surpriziĝmaniere - teksaĵpeco.
- 17 esti en probabla kondiĉo(r) - fiŝkaptilo - jarparto - arbo (inverse) - ronĝi(r).
- 18 ornama deo - dise observata kaj renkontata.
- 2 adev verbo - elektrodo - mambesto(r) - eta frukto(r).
- 3 kurba ostoj - ludo - neinerta.
- 4 demandvorto - laŭ uzo profita(r).
- 5 prefikso - pejorativadjektivo - astro(r) - adverbo.
- 6 sufikso - prefikso - voĉduono - nedifina pronomo - verbofinaĵo.
- 7 objekto de la penso - kapoprotektilo(r).
- 8 fungoĉelo - artiklo - korpoparto.
- 9 loĝanto de soveta respubliko.
- 10 eksterigi sian kapablon - korpoparto - laŭ maniero de azia lando - adverbo en malordo.
- 11 ŝafonomatopeo - blinde fervora al doktrino - parto de radio.
- 12 sufikso - prepozicio - salmokapo - komenco de iktero.
- 13 fluvo - litero - glitbreto(r) - elektra veturilo.
- 14 sufikso - parto de imposto - prepozicio - teniĝo antaŭ pentristo(r) - prefikso - sufikso.
- 15 maniero veturi sur bataalkampo - prezentanta klaran aspekton - iom da nobleco - irmaniero de akvobirdo(adv.).
- 16 kapo de otario - spasme kaj brue elspiri(r) - kulturcentro (siglo) - ŝtoneca tavolo(fonet.).
- 17 litero - grafiko(r) - litero - sundio.
- 18 sin direkti al - verda insulo en dezerto - papago - maldura(r).
- 19 festoj - tempoparto - homkoro - hispana fluvo.
- 21 alta konstruaĵo - verbo por d'Aboville.
- 22 prepozicio - bufkapo - unua muziknoto - tukopeco.
- 23 parto de loto - sufikso - prepozicio - verbofinaĵo.
- 24 litero - kuirilo.
- 25 vizaĵo parto - muzikilo - legomo(r).
- 26 numeralo - grupiĝoj de ŝtatoj - malpuraĵo(r).
- 27 divano - sufikso - ekscitiĝa zorgo.

segnaĵo - labiaco - fluganta besteto. **VERTIKALE** 1 kreskiĝoj de rapideco - litero - dise observata kaj renkontata. 2 adev verbo - elektrodo - mambesto(r) - eta frukto(r). 3 kurba ostoj - ludo - neinerta. 4 demandvorto - laŭ uzo profita(r). 5 prefikso - pejorativadjektivo - astro(r) - adverbo. 6 sufikso - prefikso - voĉduono - nedifina pronomo - verbofinaĵo. 7 objekto de la penso - kapoprotektilo(r). 8 fungoĉelo - artiklo - korpoparto. 9 loĝanto de soveta respubliko. 10 eksterigi sian kapablon - korpoparto - laŭ maniero de azia lando - adverbo en malordo. 11 ŝafonomatopeo - blinde fervora al doktrino - parto de radio. 12 sufikso - prepozicio - salmokapo - komenco de iktero. 13 fluvo - litero - glitbreto(r) - elektra veturilo. 14 sufikso - parto de imposto - prepozicio - teniĝo antaŭ pentristo(r) - prefikso - sufikso. 15 maniero veturi sur bataalkampo - prezentanta klaran aspekton - iom da nobleco - irmaniero de akvobirdo(adv.). 16 kapo de otario - spasme kaj brue elspiri(r) - kulturcentro (siglo) - ŝtoneca tavolo(fonet.). 17 litero - grafiko(r) - litero - sundio. 18 sin direkti al - verda insulo en dezerto - papago - maldura(r). 19 festoj - tempoparto - homkoro - hispana fluvo. 21 alta konstruaĵo - verbo por d'Aboville. 22 prepozicio - bufkapo - unua muziknoto - tukopeco. 23 parto de loto - sufikso - prepozicio - verbofinaĵo. 24 litero - kuirilo. 25 vizaĵo parto - muzikilo - legomo(r). 26 numeralo - grupiĝoj de ŝtatoj - malpuraĵo(r). 27 divano - sufikso - ekscitiĝa zorgo.

SOLVOJ de la lastaj enigmoj (N° 75) - **Krucvortenigmo:** aristokratia sabato ro eden truto admon redukto brile otario krajon nod nordano nt altairo nt noa ŭa alfa takel tali ebe ol vei imponeco aids kanjono kolum oftalmoskopoj  
**"Silab"-enigmo:** "plej bone ridas, kiu laste ridas"